

Skiado en Adelboden dum 20 jaroj

Radioprelego de Claude kaj Andrée GACOND, SRI 692, 1977.01.12 & 14 & 15

Cl.- Parolas Claude Gacond. Por la 20-a fojo mi havis la honoron kaj plezuron gvidi la nun tradician skiferion esperantistan, kiu disvolviĝas ĉiujare en Adelboden dum la kristnaskaj ferioj de la 16-a de decembro ĝis la 5-a de januaro. Tiu ĉi sporta aranĝo, kiu grupigas dudekon da sportemuloj, kies duono venas el Svislando, ne estas tre konata. Tamen ĝi ludis decidigan rolon en la vivo de multaj esperantistoj. Ĝi donis al ili la eblon praktiki la zamenhofan idiomon ekde la frumatena leviĝo ĝis la enlitiĝo en vere internacia medio, kies priokupo ne estas esperanto mem. La interlingvo ĉesis esti celo en si mem aŭ diskuttemo, por fariĝi interrilata rimedo profite al komuna intereso : la skiado kaj la grupa kunvivado. Tio ne estas ordinaraĵo en Esperantio.

Ĉiujare la duonon de la partoprenantaro formas revenantoj. Tiu kerno de malnovuloj faciligas la formadon de agrabla grupa etoso, ĝi estas la portanto de tradicioj, kiujn la novuloj rapide asimilas. Estas rimarkinde, ke neskiantoj neniam vere asimiliĝis en la grupa vivo de la ĉaledo Egghaus, ĉar ili ne samritme, ol sportemuloj, adaptiĝas al la tagokazaĵoj. Skiantoj ŝatas frue leviĝi por profiti pri la sunbrilaj horoj. Vespere ili ne celas al tro rafinitaj intelektaj okupoj : simplajn ludojn, kantadon, lumbildajn raportojn pri migradoj en la montaroj ili ŝatas. Ankaŭ longe manĝi en gaja etoso ili emas, kaj en la grupo la kuirstino okupas ĉeflokon: ŝian arton ĉiuj laŭdas per laŭtaj dankvortoj kaj ĉefe videbla voremo. Tiujn ĉi vintron unu el la bankedoj vesperaj celebradis la dudekjariĝon de la aranĝo.

Tio permesis memorigi, kiel ŝanĝiĝis Adelboden dum kvinono de jarcento. Malfacile la nunaj partoprenantoj imagas, kiel estis la vivo en la ĉaledo Egghaus antaŭ la instalado de centrala hejtado, de lav- kaj duŝejoj, de bone ekipita kuirejo kaj de komfortaj kuŝejoj. Nur kelkaj pioniroj memoras pri la malnova malvarma kuirejo, ke la akvo frostis dum la nokto transformante la plankon je glaciejo; pri la necesejo, kiu estis nur fektruo en ekstera domaldonaĵo, kie blovadis la vento; irado necesejen estis tuta aventuro, kiun oni pretigis sin bone vestante; poste sekvis vera luktado kontraŭ ascenda aerfluo por faligi la paperojn en la fektruon; tial la necesejo estis daŭra ŝercotemo en la grupa vivo; la komforton oni tiam anstataŭis per ridado. Jen foraj rememoroj.

Ankaŭ la skiado multe ŝanĝiĝis en dudek jaroj. Dum la jaroj 1950-aj ne nur malabundis la skiveturiloj, sed ankaŭ la mono, kiu permesis ilin uzi. Tial matene oni ĝenerale fiksitis felojn sub la skiojn por marŝe alsupri la skiadejojn. Sekvis pikniko en monta restoracieto, kie raris la manĝantoj. La alvalado disvolviĝis sur vegoj preskaŭ dezertaj. Dum la neĝfalado la nura skilifto Kuonigsbergli funkciis senpage por la skiantoj, kiuj akceptis partopreni al la premado de la ĉefa vego.

Hodiaŭ Adelboden fariĝis tute alia. La ĉaledon Egghaus ĉirkaŭas centoj da aliaj lignodomoj, kaj sur ĉiuj skieblaj deklivoj grimpadas liftoj. Je la tuja proksimeco de nia restadejo la skilifto Kuonigsbergli kaj Fleckli, kun permaŝine premitaj vegoj facilaj aŭ krutaj, kontentigas la lertajn skiantojn, kaj 4 skiliftetoj helpas la komencantojn rapide asimili la sektretaron de la skiarto.

Dum la ekskurstagoj estas facile atingeblaj aliaj skiparadizoj: Enstligenalp al kiu oni veturas per telfero. Tie skilifto suprenigas nin ĝis alteco de 2'500 metroj sur la flanko de la sovaĝa montego Wildstrubel, kie foje blovadas valen ege malvarma vento. En Elsigentalp, alia valo super rokoj atingebla per telfero, aro da skiliftoj permesas skii admirante vastegan

panoramon. Ankoraŭ pli vastan panoramon oni havas el la pasejo Hahnenmoss, al kiu oni veturas aŭtobuse kaj poste seĝlifte en komfortegaj gondoloj. Tie oni troviĝas en neordinara skiloko, kie la spertuloj povas dum tuta tago skiadi sen dufoje sekvi la saman vegon; pli ol 10 skiveturiloj kondukas al diversaj suproj, el kie alvaladas aro da vegoj regule premitaj. Ĉiutage miloj da skiantoj dancadas sur tiuj deklivoj admirante la ŝanĝantan pejzaĝon alpan. Oni povas skii ĝis plena ebriiĝo, kio estas sana kaj neordinara plezuro rezervita al elito.

Anstataŭis la montajn restoracietojn grandegaj memservaj kaj komplete aŭtomatigitaj restoraciejoj, kie iam ajn vi povas ripozi kaj satiĝi. Estas vere tute alia vivo. Antaŭ dudek jaroj nur malplimulto povis skii en la montaroj; hodiaŭ la turismo demokratigis tiun ĉi sporton. Povas esti, ke naturŝatantoj de tempo al tempo sopiras je soleco. Tiam restas je ilia dispono valoj ĝis nun restintaj netuŝitaj, kiujn kurskijaj vegoj laŭiras. Tiam en sensunaj valfundoj, en senbrujaj arbaroj, fore de loĝataj ĉaledoj, estas eble malkovri la spurojn, kiujn la vulpoj, leporoj, kapreoloj kaj ĉamoj lasas post si.

Mi esperas, ke foje vi havos la okazon intimiĝi kun la skiado en Adelboden, kaj tio eble en la venonta esperantista skiferio. Petu la informilon!

Vi aŭdis prelegon el Svislando. Parolis Claude Gacond. Ĝis reaŭdo!

*Kopirajto © Claude GACOND, www.esperanto-gacond.ch
Prilaboris: [Stefano KELLER](#), junio 2012*